

Reformo de la esperanto-instruado, 7-a parto
Claude Gacond, 182-a radioprelego, 1967.04.05 & 1967.04.08

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni atentigis vin pri la rolo de la dialogoj en la lernado de la parola uzo de lingvo. Hodiaŭ ni diru kelkajn vortojn pri alia tekniko, kiu ankaŭ celas la instruadon de fraz-modeloj. Tiu tekniko estas nomata lingvo-laboratorio.

A.- Ni jam priskribis klasejon, kiu servas al lingvo-laboratorio. Hodiaŭ estas la eblecoj, kiuj sin prezentas por la instruado de esperanto, kiuj nin interesas.

Cl.- Lingvo-laboratorio instruas per plej multe da rimedoj. Pro tio oni diras ofte pri ĝi, ke ĝi estas metodo aŭdo-vida. Aŭdo, ĉar la lernantoj aŭdas paroli, vida, ĉar samtempe ili devas rigardi bildojn.

A.- Per kelkaj komikaj desegnaĵoj kaj taŭgaj demandoj oni povas multon instrui. Ni imagu situacion. Oni volas instrui la akuzativon. La lernanto ricevas folion kun dekdu desegnaĵoj. Kaj la magnetofono humure rakontas kaj demandas pri tiuj bildoj.

Cl.- Ni unue vidas junulon, kiu dormas, kaj vekilon, kiu sonoras. La sonbendo diras : *Tadeo dormas. Kiu dormas ?*

A.- *Tadeo dormas.*

Cl.- Li sonĝas kaj ronkas. *Kiu sonĝas ?*

A.- *Tadeo sonĝas.*

Cl.- *Li vidas sian patrinon, kiu flugas super mondo. Kiun li vidas ?*

A.- *Li vidas sian patrinon.*

Cl.- *Subite la vekilo sonoras. Kio sonoras ?*

A.- *La vekilo sonoras.*

Cl.- *La vekilo vekas Tadeon. Kiun vekas la vekilo ?*

A.- *La vekilo vekas Tadeon.*

Cl.- Ĉu Tadeo ankoraŭ vidas sian patrinon flugi ?

A.- *Ne, Tadeo ne plu vidas sian patrinon flugi, li ne plu sonĝas.*

Cl.- Dua bildo montras la junulon, kiu manĝas panon, buteron, fromaĝon, trinkas lakton, rigardas la horloĝon, aŭskultas la radion. La sonbendo daŭrigas sian rakontadon kaj demandadon : *Tadeo manĝas panon. Kion manĝas Tadeo ?*

A.- *Tadeo manĝas panon.*

Cl.- *Tadeo trinkas lakton kaj aŭskultas la radion. Kion trinkas Tadeo ?*

A.- *Tadeo trinkas lakton.*

Cl.- *Kion aŭskultas Tadeo ?*

A.- *Tadeo aŭskultas la radion.*

Cl.- Por ebligi al la lernanto kontroli la gramatikan ekzaktecon de liaj respondoj, la sonbendo ĉiam post momenteto donas la taŭgan respondon kaj lasas al la lernanto la tempon por ripeti duan fojon la respondon. Kiam la dekdu bildoj estas komentitaj, la lernanto estas uzinta

Reformo de la esperanto-instruado, 7-a parto
Claude Gacond, 182-a radioprelego, 1967.04.05 & 1967.04.08

multfoje fraz-strukturojn, kiujn oni povas simboli per *o – as – on*, responde al demandoj, kiujn oni povas simboli per *Kion –as –o*, aŭ *Kiun –as –o*.

A.- Aliaj bildaroj instruas aliajn strukturojn. Ĉiam estas uzataj vortoj apartenantaj al la fundamenta kaj plej ofta radikaro. La celo de tiu instruado ne estas riĉigi la vortprovizon. Ĝi estas krei lingvajn strukturojn, aŭtomatajn refleksojn.

Cl.- Oni nun povas uzi la samajn bildojn en kolektiva leciono. Oni ilin projekcias, kaj la lernantoj kolektive aŭ individue faras la demandojn kaj diras la respondojn. La instruanto tre atentigas pri la gramatika korekteco. La erarojn li forigas per remeto de la samaj bildoj, ĝis kiam ĉio estas absolute ĝusta.

A.- Tiuj ekzercoj ŝajnas al ni bone konveni al la esperanta kluba vivo. Per bildaro oni povas instrui plej diversajn aferojn.

Cl.- Oni humore povas montri la diferencon inter veturi per trajno, per aŭtomobilo, per biciklo, kaj veturi kun trajno, kun aŭtomobilo, kun biciklo.

A.- Oni povas montri, kio estas botelo da vino kaj botelo de vino, poto da teo kaj poto de teo, glaso da siropo kaj glaso de siropo.

Cl.- Oni povas montri la diferencon inter levi kaj leviĝi, turni kaj turniĝi, komenci kaj komenciĝi.

A.- Oni povas, donante temp-indikojn, uzi la verbfiniĝojn *–as*, *–is* kaj *–os*, kaj la participojn aktivajn kaj pasivajn.

Cl.- Oni povas komprenigi, ke ekzistas verboj, kiuj ne povas havi at-participojn, dum aliaj ne povas havi it-participojn.

A.- Fakte ĉio povas esti instruata per la aŭdo-vida metodo. Pro tio lingvo-laboratorioj estas muntataj ĉiam pli vastskale en la lernejoj. Per ili la plej malfacilaj lingvoj estas instruataj kun tre pozitivaj rezultoj. Oni eĉ antaŭvidas la momenton, kiam tiu tekniko sin trudos por la instruado de la fremdaj lingvoj al la infanoj.

Cl.- Granda paŝo estos tiam farita por la solvado de la interlingva problemo. Sed ĉu la esperantistoj lasos la naciajn lingvojn monopoligi tiun teknikon ? Ĉu ili ne profitos ankaŭ uzi tiun teknikon por disvastigi la instruadon de la lingvo internacia ?

A.- Nia epoko apartenas al la popoloj, kiuj mastras la teknikilojn. Tion bone komprenis la usonanoj kaj rusoj, kiuj prezentas sur la pedagogian merkaton aŭdo-vidajn kursojn de la angla kaj rusa lingvoj, kiuj estas bonege verkitaj. Nun estas verkataj en la universitatoj similaj kursoj de la franca, hispana, germana, araba kaj japana lingvoj.

Cl.- Kiam bona kurso ekzistas, eĉ instruanto malbone konanta la lingvon povas instrui ĝin. Oni eĉ vidas personojn, kiuj eĉ ne konas la lingvon, ĝin instrui per lingvo-laboratorio al centoj da gelernantoj.

A.- Tio signifas, ke ni eniris epokon, kiam iu ajn lingvo povos esti instruata sen instruantoj al ĉiuj infanoj de la mondo. Ĉu tio estos favora al la lingvo internacia aŭ nur al la ĉefaj kulturlingvoj ?

Cl.- Se la esperanta popolo kapablos sufiĉe rapide mastri la instruteknikon, ĝi havos lokon sub la suno en la morgaŭa mondo. Se kontraŭe ĝi lasos al la naciaj lingvoj la monopolon pri la instru-tekniko, ĝi devos kontentiĝi ludi etegan rolon en la morgaŭa mondo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Reformo de la esperanto-instruado, 7-a parto
Claude Gacond, 182-a radioprelego, 1967.04.05 & 1967.04.08

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-